



Esperanto-Aktivistin ins Europaparlament gewählt

Polnische Kandidatin Malgorzata Handzlik setzte sich mit großer Mehrheit durch

(red) Wegen des komplizierten polnischen Wahlsystems kam die Freudenbotschaft erst am Dienstag nach dem Wahltermin: Mit mehr als 30.000 Stimmen zog Malgorzata Handzlik als eine von 54 polnischen Abgeordneten ins Europaparlament ein. Damit ist erstmalig ein aktiver Esperantist dort vertreten.

Frau Handzlik und ihr Ehemann Georg Handzlik, ein renommierter Esperanto-

Sänger, sind samt ihren Kindern vielen deutschen Esperantofreunden von Veranstaltungen wie der Internationalen Frühlingswoche (PSI) wohlbekannt. „Esperanto *aktuell*“ schließt sich den Glückwünschen für Frau Handzlik an und wünscht ihr alles Gute für ihre politische Arbeit, die sich natürlich nicht nur auf ein Eintreten für Esperanto beschränken wird.

An diesem Beispiel wird sichtbar, dass die neuen EU-Mitgliedsstaaten für Überraschungen sorgen können. In den verknöcherten Systemen der großen deutschen Parteien findet sich unter den hochrangigen Mandatsträgern kein aktiver Esperantist: Durch die Wirkung einer latenten Diskriminierung von Esperantobefürwortern ist das praktisch ausgeschlossen.

(Eine Grußbotschaft von Frau Handzlik findet sich auf S. 15)



Esperanto-Briefmarke zur Osterweiterung der Europ. Union

Am 1. Juli 2004 erschien zur Osterweiterung der Europäischen Union in Österreich die Briefmarke "Esperanto 2004". Das Markenbild zeigt eine 20-Groschen-Marke, welche anlässlich eines Esperanto-Kongresses in Graz 1949 erschienen ist, und den Gruß "Saluton!!!". Die Nominale der nur in Österreich frankaturgültigen Marke ist 0,55 EUR. Herausgeber ist die Esperanto-Arbeitsgemeinschaft mit dem Sitz in Wien.

Nach Mitteilung von **Walter Klag**

(red) In Österreich ist es seit einiger Zeit möglich, privat die Herausgabe von Briefmarken zu veranlassen, sofern man bereit ist, den entsprechend hohen Preis dafür zu bezahlen. Die Reklamewirkung ist natürlich enorm. Da die Marken frankaturgültig sind, handelt es sich um anerkannte Sammlerobjekte, die wegen ihrer sehr kleinen Auflage gesucht sind, besonders auf nachweislich echt gelaufenen Briefen. Der Deutsche Esperanto-Bund hat in der Vergangenheit mehrfach Sonderstempel in Auftrag gegeben.

40-procenta kresko en la Interreto

Esperanto disvastiĝas laŭ serĉmaŝino Google

Se oni entajpas la serĉvorton „Esperanto“ ĉe la serĉmaŝino *Google*, oni ricevas indikon pri nuntempe inter 1,1 kaj 1,26 milionoj da paĝoj laŭ la diverslandaj paĝaroj de *Google*. En la pasintjara aprilo la sama nombro estis proksimume 750.000 paĝoj. Tiurilate Esperanto do kreskis per 40 gis 50 procentoj en unu jaro.

Al la kresko kontribuas pluraj faktoroj - unuflanke plimultiĝas la Esperant-lingvaj paĝoj kaj aliflanke la paĝoj, kiuj mencias Esperanton. Krome la kresko estas parto de ĝenerala progreso de la Interreto kaj eble ankaŭ de la traserĉado de la reto pere de serĉmaŝinoj.

Sendepende de la fono estas evidente, ke la 40-procenta kresko de la paĝoj indikitaj de *Google* rilate al Esperanto signifas imponan progreson de Esperantujo.

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand

Auf einen Blick

82. Deutscher Esperanto-Kongress 2005 in Bad König

Seite 5

La estonteco de la Germana Esperanto-Junularo (2)

Seite 6

Vjetnama Esperanto-Junularo aktivas

Seite 13

2a SOMERE: Plia internacia aranĝo establiĝis

Seite 14

82. Deutscher Esperanto-Kongress 2005 in Bad König

Liebe Mitglieder,

nachdem unser Kongress in Neubrandenburg so erfreulich verlaufen ist, nicht zuletzt durch die großartige Arbeit des Organisationsteams, möchte ich Sie bitten, sich möglich schon jetzt für das nächste Jahr in **Bad König** anzumelden.

Ich selbst wohne ganz in der Nähe, kenne also die Gegend und kann Ihnen versichern, dass sich die Reise lohnen wird. Die Nähe zu meinem Wohnort ist natürlich nicht der Grund, warum wir diesen Ort gewählt haben, sondern eher deswegen, weil Bad König fast in der Mitte Deutschlands liegt, also für alle leicht erreichbar ist: Mit dem Auto, mit der Bahn und mit dem Privatflugzeug (der Flugplatz Michelstadt liegt nur 7 km entfernt). Außerdem werden wir Sie zu herausragenden Sehenswürdigkeiten führen, darunter zum Elfenbeinmuseum in Erbach, welches einzigartig in der Welt ist.

Darüber hinaus gibt es diesmal sogar drei Vorträge bekannter Persönlichkeiten: **Aleksander Korĵenkov** (Herausgeber von La Ondo de Esperanto), **Herbert Mayer** vom Esperanto-Museum in Wien und **Prof. Dr. Reinhard Selten**. Schließlich wird auch das Kulturprogramm reichhaltig sein: geplant sind unter anderem eine Theateraufführung sowie ein Konzert von **Georgo Handzlik**. Trotz aller dieser Arrangements sollten Sie nicht versäumen, an der Mitgliederversammlung teilzunehmen, denn im Jahr 2005 stehen Vorstandswahlen an.

Insgesamt also ein attraktives Programm, und voraussichtlich wird der Kongress an Teilnehmerzahl einer der größten der letzten Jahre, wenn nicht gar der letzten Jahrzehnte werden. Da sollten Sie dabei sein!

Mit herzlichen Grüßen,

Ihr **Andreas Emmerich**

21. Internationale Frühlingswoche (PSI) lädt ein

Eh man sich's versieht, ist schon Zeit, den Familienurlaub 2005 zu planen. Dazu lädt eine traditionsreiche und beliebte Veranstaltung, die Internationale Frühlingswoche (Printempa Semajno Internacia) zum 21. Mal besonders Familien über Ostern ein. Der Termin 21.-28. März umfasst die Karwoche bis einschließlich Ostermontag.

Tagungsort ist der Flensunger Hof, eine mit allen Bequemlichkeiten ausgestattete Ferienstätte im Dörfchen Mücke, das unweit der Universitätsstadt Gießen und des Vogelsberges liegt.

Man kann sich elektronisch (unter <www.esperanto.de/psi/2005/alighilo.html>) oder beim Veranstaltungsleiter Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, 53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, anmelden.

„Dankon, karaj Eŭropaj Esperantistoj!“

(red) **Clarimundo Barbosa Netto** el Brazilo rondvojaĝis tra Germanujo kaj najbaraj landoj. Li poste sendis dankleteron al la multaj helpantoj kaj gastigantoj, el kiuj la sekvantaj linioj estas ĉerpitaj.

Danke al Esperanto, danke al la iniciato de Germanaj Esperanto-parolantoj mi havis dum la monatoj aprilo kaj majo la ŝancon, ekkoni parton de Eŭropo, realigi mian revon, vidi neĝon sur la Alpaj montoj, antikvajn palacojn, la famajn Germanajn mez-epokajn konstruaĵojn, iom da Itala kulturo, interkonatiĝi kun tiom da karaj kaj koraj Esperantistoj, ree paroli kun iuj, kiuj jam volontulis en mia hejmo Bona Espero, percepti, kion signifas vere frosti kaj havi malvarmajn piedojn, vidi la nordan maron kaj la adriatikan maron kaj partopreni la elektokampanjon de la unua Esperantista deputitino de la Eŭropa Parlamento, Margareta Handzlik!

Ha! Kia emocio vivi en tiu malnova mondo tute nova por mi, kampara Brazila studento, eksa lernanto de Bona Espero! Malfacilas esprimi mian senliman dankon al ĉiuj bonvolaj homoj, kiuj ebligis al mi tian sperton. Mi komprenas, ke la vivo regas min per valora riĉeco - esti membro de la granda familio de Esperanto-parolantoj.

Mi nun pli bone komprenas la signifon, esti parto de movado sen profitaj celoj, de homa solidareco, movado kun granda idealo. Oni akceptis min en la intimeo de sia hejmo kiel membron de la familio. Dankon, karaj Eŭropaj Esperantistoj!



Clarimundo Barbosa Netto dum la renkontiĝo de Rejnland-Vestfalia Esperanto-Ligo (REVELO-tago) en Schwelm.

Foto: Hedwig Fischer

La programo de rondvojagoj de Esperantistoj estas laŭ mi ege signifa por la vizitantoj kaj por la kluboj, ĉefe en malgrandaj urboj.

Tiaj internaciaj iniciatoj montras, ke Esperanto vivas.



Vjetnamujo

Vjetnama Esperanto-junularo aktivas



(red) Laŭ iniciato de Vjetnama Esperanto-Asocio kaj la Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj 20 studentoj komencis lerni Esperanton en Vjetnamujo. 15 el ili nur 5 monatojn poste praktikis la lingvon dum internacia Esperanto-kongreso kiel ĉiĉeronoj kaj ceteraj helpantoj. Intertempe la eksnovuloj mem pluinstruis pliajn junulojn, tiel ke nun prezentis sin Vjetnama Esperanta Junulara Organizo (VEJO) kun jam 50 membroj. El „La Amikeco“, komuna retgazeto por Japanujo, Koreujo, Vjetnamujo kaj Ĉinujo, <www.la-amikeco.net> - „Esperanto *aktuell*“ gratulas pro tiu modela aktivado.

Kroatujo

Ĉefministro laboris por Esperanto

(ret-info) La nova Kroata ĉefministro **d-ro Ivo Sanader** estas laŭ sia profesio specialisto pri lingvoj kaj literaturoj. En la jaro 1998 Kroata Esperanto-Ligo eldonis libron „En tiu terura momento“, kiun redaktis d-ro Ivo Sanader kun sia kolego d-ro Ante Stamac. Temis pri tiutempa antologio de Kroata milita liriko. La versojn tradukis 15 Kroataj Esperantistoj, la enkondukon verkis la akademiano Dalibor Brozovic, prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo. La poemaro troveblas en la Roterdama libroservo.

el (landa agado)

Spomenka Štimec

Litovujo

Konsultiĝoj en biblioteko

(ret-info) En la publika biblioteko Kalvarijos en Vilnius, Litovujo, jam dum kelkaj monatoj konstante funkcias lingvaj konsultoj pri Esperanto por tiuj, kiuj studas Esperanton memstare. Tion gvidas la konata Vilnusa Esperantisto **Antanas Mekys**, aŭtoro de kelkaj Esperanto-lernolibroj por Litovoj kaj Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio. Pri la Esperanto-konsultado konstante aperas anoncoj en la ĉiutaga tutlanda gazeto „Lietuvos aidas“.

el (landa agado)

Povilas Jegorovas

litova.ea@mail.lt

Brazilo

Imitinda varbado

(ret-info) En la urbo Campos la loka Esperanto-grupo ĉiu-semajne elektas artikolon el Esperanto-gazeto kiel MONATO ktp. kaj komune tradukas ĝin al la Portugala. Poste la traduko iras al la plej granda loka gazeto LA CIDADE, kiu publikigas la artikolon kaj mencias, ke la originalo estis en Esperanto, aldonante la kontaktadreson de la loka klubo.

Aloisio Sartorato

ludoviko44@yahoo.com.br

Danujo

Esperanto Desperado police persekutata

(vinilkosmo) Lastan decembron la polico „pro iu nebula afero“ sekvestris la materialon, per kiu la Esperanta rokgrupo Esperanto Desperado ĵus preparis novan albumon. Intertempe Kim Henriksen, kantisto kaj akordionisto de la grupo, povis bonŝance informi, ke li reakiris ĉion kaj ke ili povas plulabori.

Tajvano

Esperanto en radio-programo

La ĵurnalisto Martin Aldrovandi de la German-lingva sekcio ĉe Radio Tajvano telefonante al Reza Kheir-Khan de la urbo Ping Tung en Tajvano intervjuis lin pri Esperanto kaj lia agado. Kortuŝa estas la opinio de la Tajvan-Franca familio Hong, kiu decidis, komune lerni Esperanton, ĉar „kuniĝis nun 25 landoj al Eŭropa Unio, tiel ke tiu nun certe adoptos Esperanton kiel komunan interkomunikilon. Kaj ni volas paroli kun la Eŭropanoj.“ La programo daŭris 21 minutojn kaj estis tre favora pri Esperanto. „Esperanto *aktuell*“ kontaktis la ĵurnaliston kaj sendis laŭ lia peto perrete German-lingvan kurso-materialon. Eblas aŭskulti la programon tra la tt-ejo de Radio Tajvano ĉe <www.cbs.org.tw>

Laŭ atentigo de Dafydd ap Fergus



La unua Esperantista Eŭropa Parlamentano

Malgorzata Handzlik sin prezentas

[...] mia nomo estas Malgorzata HANDZLIK, Esperantistoj nomas min Margareta. Mi estas la edzino de Georgo HANDZLIK - la Esperanta kantisto, verkisto, eldonisto kaj instruisto. Esperanton mi parolas 20 jarojn. Mi vizitis UK-ojn en Berlino kaj Montpeliero, krome multajn lokajn aranĝojn. Dum du monatoj mi kun mia familio estis en Brazilo invitataj de gesinjoroj Grattapaglia, el Bona Espero. Mia TTT-paĝo:

<www.Malgorzatahandzlik.com>

Mi neniam agis en politikaj partioj. Nur dum la kampanjo mi aliĝis al Civitana Platformo (Platforma Obywatelska). En Eŭropa Parlamento mi agos en la plej granda frakcio EPP (Eŭropa Popola Partio). Kelkaj samideanoj skribis, ke mi estas la unua Esperantisto-membro de Eŭropa Parlamento (EP). Mi ne kontrolis tion. La kampanjon ni faris dum du monatoj kaj mi gajnis unu el plej bonaj rezultoj en la lando.

Dankon pro sugestoj, ke mi zorgu en EP pri Esperanto. Tio evidente estas unu el miaj intencoj. Por efikdone agi mi nun volas aliĝi al la Komisiono pri Kulturo Edukado, Junularo kaj Sporto, kiu inter la aliaj okupiĝas pri lingvoj. Tio fakte ne estas facila tasko, ĉar estas multaj volontuloj al la komisiono. Kaj la decido

apartenas ne nur al la parlamentano, sed ankaŭ al la partio.

Krom salutoj venis al mi kelkaj mesaĝoj kun proponoj kunlabori internacivele pri kulturo, ankaŭ venis al mia retadreso kelkaj gratuloj al Civitana Platformo pro elekto de Esperantistino al EP. Mi prezentos ilin al la estroj de la partio, eble tio subtenos miajn strebojn eniri la Komisionon pri Kulturo.

Krom Esperantaj amikoj en ĉiuj Eŭropaj landoj mi havas aliajn kompetentecojn por la Komisiono pri Kulturo, Junularo Edukado kaj Sporto, pro la jenaj faktoj:

- jam dudek jarojn mi gvidas radion,
- mi fondis instituton por instrui instruistojn,
- mi fondis lingvo-lernejon,
- mi profesie laboris en skolta movado.

Mi estos dankema pro ĉiu mesaĝo kun propono kunlabori sur kultura kampo internacia.

Se mi eniros la Komisionon pri Kulturo, mi havos realan ŝancon pledi por Esperanto. Tiam volonte mi diskutos kaj renkontiĝos kun ĉiuj, kiuj havas spertojn pri lobiado [premado] por Esperanto ĉe EP.

Sincere, **Margareta Handzlik**
Eŭrodeputito

Diskriminierung in der Europ. Union

(red) Unter der Netzadresse <[//europa.eu.int/comm/employment_social/fundamental_rights/greenpaper_en.htm](http://europa.eu.int/comm/employment_social/fundamental_rights/greenpaper_en.htm)> findet sich eine EU-Umfrage über Diskriminierung. Auch möglichst viele Esperanto-Freunde, die gegen sprachliche Diskriminierung sind, sollten sich beteiligen.

Interessant ist, dass „Sprache“ unter den Möglichkeiten der Diskriminierung zunächst gar nicht genannt wird (das kann

man per Bemerkung monieren), aber später unter „Ferner-liefen-Diskriminierungen“ doch anwählbar ist.

Wie Theorie und Praxis auseinander klaffen, sah man am Wahlprogramm der Grünen in Deutschland, die sich gegen sprachliche Diskriminierung einsetzten, den Wahlkampf aber zum Teil auf Englisch führten („Eurogreens“)! Eine diesbezügliche Bitte von mir um Erklärung dieses Widerspruchs blieb ohne Echo.

Kurz und knapp

„De Lannesregeeren weet woll nich noog Bescheed, wat Plattdütsch för Land un Lüd bedüden deit.“ So SPD-Landtagsabgeordneter Claus Johannßen zur Streichung des einzigen Plattdeutsch-Lehrstuhls in Niedersachsen. Dabei hatte die regierende CDU gerade im Landtag einen Entschließungsantrag zur Stärkung der Regionalsprachen eingereicht.

Elbe Weser Aktuell 23.05.2004

Unter dem Motto „Normen, Vielfalt und Herrschaft“ beschäftigten sich internationale Experten mit Europa und seinen Sprachen in Brigittenau/Österreich. François Grin von der Universität Genf erklärte in diesem Rahmen: „Man kann aber feststellen, dass die Dominanz einer einzigen Sprache ungünstig ist, weil sie den jeweiligen native speakers eine große (Markt-)macht und ihren Ländern eine hohe Ersparnis an Ausbildungskosten bringt. Unter diesem Aspekt wäre der Unterricht Esperanto statt Englisch viel kostengünstiger und politisch unbedenklicher, da damit keine Sprachengruppe bevorzugt wäre.“

Verband Wiener Volksbildung vom 3.2.2004

In der Slowakei gab es bei der Europawahl in den Wahllokalen Erläuterungen nur auf Slowakisch und Englisch. Einheimische Sprachminderheiten blieben unberücksichtigt. Slovakia Esperanto-Junularo, 5.6.2004

Eklat im Europarat: Am 22.6.2004 verließen die französischen Delegierten unter Protest die Sitzung, nachdem ihr Landsmann Trichet als Vertreter der Europäischen Bank in seiner Rede auf Englisch umschwenkte.

Mitteilung von Frau Dominique Couturier, Bayers, in der Netzgruppe parlament-agado@yahoogroups.com